UDK 001(05)=089.2
YU ISSN 0048-9557

# SCIENCA REVUO

Vol. 27, n-ro 4(120)
30.08.1976.

Aperas 6-foje jare. Jarabono: 56 stelojn, 15 ned.guld., 6 us. dol., 100 jug.din.

ENHAVO:

*T.Tyblewski:* Internacia turismo de la esperantistaro
*B.Popović:* Malgrandaj tempunuoj
*C.Støp-Bowitz:* La natura ekonomio de la maro
*V.Ja.Suponickij:* Influo de limfadenektomio kaj injekto de limfadena ĉelsuspenso al la vivkapablo ĉe rena alogrefto

## DOKTORIĜO PER KOMPARO DE PLANLINGVO (ESPERANTO) KAJ NACIA LINGVO (LA GERMANA)

La 16an de junio 1976. Detlev Blanke, estro de la sekcio Esperanto en Kulturligo de GDR kaj sekretario de la Centra Laborrondo, defendis sian doktorigan disertacion antaŭ la sociscienca fakultato (sekcio germanistiko) de Humboldt-Universitato de Berlin (GDR). La disertacio, kiu konsistas el du volumoj (170 p. + 26 tabeloj; notoj kaj literaturo 74 p.) portas la titolon:

"Planlingvo kaj nacia lingvo, kontribuo por esplorado de iliaj specifaj komunikadaj potencoj, montrita per konfronta komparo de kelkaj problemoj el la vortfarado de Esperanto kaj la germana lingvo" (Plansprache und Nationalsprache, ein Beitrag zur Erforschung ihrer spezifischen Kommunikationsleistungen, gezeigt am konfrontativen Vergleich einiger Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen).

La disertacio i.a. klare montras, ke konscia efikado de la homo je la instrumento lingvo estas tre disvastigita (lingvo-planado), substrekas la fakton, ke sole Esperanto funkcias kiel planlingvo kaj sekve nur ĝi estas esplorebla kiel lingva fenomeno. Plue Blanke pritraktas kelkajn bazajn problemojn de la vortteorio de Esperanto kaj de la germana lingvo (morfeminventaro, signifo de la vorto, kombineblo de morfemoj al morfemkonstruaĵoj, motivige de la signifo de vortoj, nacia influo je la signifo de la vorto en Esperanto, lingva ekonomio).

La ĉefa parto de la disertacio pritraktas la plej gravajn konstrumodelojn de substantivo, adjektivo kaj verbo en la komparataj lingvoj. La disertacio, kiu indikas preskaŭ 400 fonto-verkojn, estas ekspertizita de la profesoroj d-ro Erwin Arndt (germanisto), d-ro Viktor Falkenhahn (slavisto-esperantologo) ambaŭ de Humboldt-Universitato, kaj de d-ro M.J. Isaev (interlingvisto), Moskvo.

Tiu doktoriga disertacio pri "la kompara lingvistiko-esperantologio", apartenas al la vere tre malmultaj disertacioj entute, kiuj ĝis nun estas verkitaj pri Esperanto en internacia skalo (Wüster, Manders). Ĝi vekis neantaŭvidite pozitivan eĥon en lingvistaj rondoj kaj sendube malfermos la pordon al pluaj seriozaj sciencaj aktivecoj en GDR. La universitato donis por la tuto la maloftan, plej altan predikaton "summa cum laude" (eminenta). Per tiu disertacio Blanke denove substrekas sian kompleksan profesian agadon por Esperanto, kiu enhavas politikan, organizan kaj fake-sciencan komponentojn.